

Brazilei

jaro 2 n-ro 7 2008

**Bildstrioj
montras
sian utilon**



**Parolo de spertulo:
Mag. Emerson Werneck**



PRETER VIA LERNOĈAMBRO...

eo.wikipedia.org

likso.net

liberafolio.org

vinilkosmo.com

uea.org

edukado.net

lernu.net

...ĈIRKAŬAS MULTAJ ESPLORINDAJ MONDOJ!



Kovrililustraĵo:
Eder Benedetti

Enhavo

	Parolo de spertulo	
	Mag. Emerson Werneck	06
	Valoro de bildliteraturo (<i>lasta parto</i>)	
	Utiligo de bildstrioj en lingvaj kursoj	16
	Kromlecionoj	
	por enuigitaj lernantoj	28
	Bildrakontoj montras sian utilon nacilingve	23
	Didaktike kaj kreeme per poemoj	27
	Legideoj	33
	Dua Vivo	37
	Traduko-defio	42
	Priakuzativaĵoj	46
	Kial mi estas instruisto	50
	Libro-donaco	53
	Eldiroj	04
	Karaj Geinstruistoj	05
	La Sekcio Interne	14
	Pliriĉigu vian vortoprovizon	25
	Lude kaj Lerne	54



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info



Brazila Sekcio de ILEI

Provizora Sekciestro: Joseo Tenorjo
Sekretariino: Conceição Rodrigues
Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso
www.ileibr.org
geinstruistoj@ileibr.org
biblioteko@ileibr.org
butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 2055-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorjo
grafikarangō: Joseo Tenorjo
kontakto: revuo@ileibr.org
kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues.

Kunlaboris en tiu ĉi numero:
Emerson Werneck, Paulo Sergio Viana,
José Dias Pinto, Antonio Felix, Sylvain
Lelarge, Vitor Mendes, Thierry Salomon,
Edson Ponciano, Eder Benedetti,
David Bianchini, Martin Weichert.

Eldiroj

“Ironie, la vera lingva
problemo en Unuiĝintaj
Nacioj kaj Eŭropa Unio
kuŝas ne en la manko de
interkompreno inter naciaj
delegacioj pro malsamaj lingvoj, sed
en la efika komunlingvigado de la
angla lingvo.”



*D-ro LEE Chong-Yeong (memore) ĉe
la 3a Nitobe-Simpozio okazinta dum
la 89a UK en Pekino.*

“Miaj postuloj celas
nur la justan kaj ĝustan
agadon, kaj mi esperas,
ke miaj kritikoj vekos ĉies
respondeco-senton.”



*Zsófia Kóród, reage al sia eksigo
kiel vicprezidanto de ILEI. (Okaze de
intervjuo al la novaĵretejo
Libera Folio)*

“Se oni volas, ke
junulo malamu verkistojn
kiel Machado de Assis aŭ
Guimarães Rosa, prezentu
iliajn verkojn kiel devigajn
legaĵojn. Li apenaŭ povos senti amon
al literaturo per kriterioj didaktika,
pedagogia, pragmata k.a.. Literaturo
estas plezuro, kiun oni povas stimuli,
sed ne preskribi.”



*Joel Rufino dos Santos, Prof. pri
Literaturo ĉe Universitato de Rio,
intervjue al revuo “Nova Escola”
n-ro 211/2008.*

Karaj

Geinstruistoj



Jen plia n-ro de la revuo farĉita per abundo da artikoloj. Al ĝiaj ordinaraj 40 paĝoj aldoniĝis pliaj 16 kiel kompenso pro via pacienca atendo. Pro manko de spaco, kelkaj kutimaj rubrikoj kaj planitaj artikoloj (re)aperos sekvanumere

Ĉi-numere konatiĝu kun la pensoj de mag. Emerson Werneck pri neologismo kaj aliaj temoj (p. 6-13); gvate akompanu la movadajn paŝojn de la Sekcio (p. 14-15); legu la trian kaj lastan parton de la artikolo pri “Valoro de bildliteraturo en lernoĉambro” (p. 16-24); pliriĉigu vian vortoprovizon per novelo de la akademiano Bernad Golden sur p. 25; ĝuu specimenon de didaktika poemo por portugallingvanoj sur p. 27; enspiru freŝan aeron de subĉielaj lecionoj gvidataj de Paulo S. Viana (p. 28-32); pligrandigu vian kolekton de legideoj proponataj de Sylvain Lelarge (p. 33-36); spertu duan vivon sub gvido de Thierry Salomon (p. 37-41); kontrolu la rezulton kaj komentojn pri la traduko-defio n-ro 3 (p. 42-45); sub gvido de José Dias Pinto (p. 46-49), strebu surgrimpi la lingvan krutaĵon plej ĝenan por portugallingvanoj; legu enklasan raporton fare de Antonio Felix pri instruado de Esperanto al tria-aĝuloj (p. 50-52); ludigu viajn lernantojn per variaĵo de la populara **ĉu-ludo** celanta praktikadon de prepozicioj (p. 54).

Kaj multon plian vi trovos en la revuo.

Agrablan kaj praktikan legadon!

Al la ĉi-numera *Parolo de spertulo* kontribuas la lingvisto Alberto Emerson Werneck Dias, el la brazila ĉefurbo Braziljo, kiu afable konsentis intervjuiĝi per interreto. La okazo intervjui lin ekestis post konatiĝo kun lia magistra disertaĵo “Renovação lexical do esperanto: mecanismos de formação de neologismos” (Leksika renoviĝo de Esperanto – meĥanismo pri formado de neologismoj).

Neologismo estas temo ĉiam freŝa kaj neelĉerpebla, kiu ordinare dividas lingvouzantojn en du ĉefajn grupojn: tiu favora al rektaj vortopruntoj kaj tiu fidema al la elvortigebleco mem de la lingvo. La unuaj pledas por libera evoluigo de la lingvo, dum la lastaj plendas, ke tro da libero kondukas al malorda prolifero. Malgraŭ la kontraŭeco, la lingvo dependas de tiu kontraŭpuŝiĝo de ambaŭ fortoj por teni sin meze en ekvilibro. Legu la intervjuon kaj mem konatiĝu kun la pensoj de nia intervjuito.

“(…)

*Lingvoj naskiĝas, vivas, mortas, latentas kaj reviviĝas,
Kiel ĉiuj vivantaj organismoj.*

*Ili amindumas unu alian, amoras kaj naskas,
Kiel ĉiuj vivantaj organismoj.*

“(…)”

AMOROJ, de Goncalo Neves — Belartaj Konkursoj de UEA, 1999
– Tria premio (poezio).

spertulo

Mag. Emerson Werneck



- Bakalaŭro pri Socia Komunikado (Ĵurnalismo)
- Bakalaŭro pri Anglaj Lingvo kaj Literaturo
- Bakalaŭro pri Japanaj Lingvo kaj Literaturo
- Magistro pri Lingvistiko (Leksikologio)
- Esperantistiĝis en 1986
- Eks-redaktoro de Brazila Esperantisto
- Respondeca ĵurnalisto pri Brazila Esperantisto
- Kunredaktoro de la Revuo Oomoto
- Tradukisto de/al la angla
- Instruisto de Esperanto, de la angla kaj de la japana.
- Eks-kunordiganto de Lernejo Berlitz en Braziljo

Brazilei: Kiam kaj kiel vi konatiĝis kun la lingvo?

Emerson Werneck: Mi loĝis en Belorizonto, kiam tie okazis la Brazila Kongreso de Esperanto. Mi jam konis la lingvon per libro, kiun mi trovis hejme, ĉar mia patro iam studis ĝin. Do, mi decidis fari la intensivan kurson de Sylla Chaves kaj lernis la strukturon de la lingvo en unu semajno. Poste mi serĉis regulajn kursojn en Belorizonto kaj daŭrigis miajn studojn en Braziljo, kien mi translokiĝis sekve. La problemo estas, ke mi kabeis, sed revenis, post pli ol dek jaroj, al la movado en la jaro 2000.



Brazilei: Kio decidigis vin pri la temo de via magistra disertaĵo, nome neologismo?

Emerson Werneck: Mia scivolemo, ĉu la lingvo daŭrigis sian kreskadon aŭ estis jam mortinta projekto. Pli profunde, mia temo estis precipe “la leksika evoluo de Esperanto”. Mi suspektis, ke Esperanto estas ja kreskanta lingvo, ĉar ĉiutage mi lernis novajn vortojn, kaj tio povus signifi, ke ĝi estas vivanta lingvo, kiel la plejparto de la naturaj lingvoj.

Brazilei: Kiajn malfacilaĵojn vi spertis dum via serĉesploro?

Emerson Werneck: Unue, mankis bonaj aktualaj libroj pri la lingvistika aspekto de la lingvo, kaj, ankaŭ, la malnovaj libroj estis malfacile troveblaj. Krome, la uzado de esperantaj komputilaj datumbazoj prezentis diversajn problemojn, kiujn mi devis konfronti dum la tuta laboro. Nur dum la lasta parto de mia laboro, mi konatiĝis kun la Korpuso de Esperanto, zorgata de Bertilo Wennergren, kaj do mi ne povis uzi ĝin. Sed mi kredas, ke la rezulto ne ŝanĝiĝus, se mi ĝin uzus. Kaj laste, mi trovis multon da antaŭjuĝoj de profesoroj en la Universitato de Braziljo, kaj ankaŭ de kolegoj mem.

Brazilei: Kiu(j)n verko(j)n vi konsideras ia deirpunkto por sistemigo de la leksika evoluo de Esperanto?

Emerson Werneck: Verdire, iu ajn nuntempa verko, sed precipe la plej

legataj revuoj de Esperantio povas esti konsiderataj kiel bona indiko de leksika evoluo en Esperanto, ĉar ili ĉiuj montras kreskadon de la nombro de eblaj vortoj en la lingvo. Mi laboris kun la tekstaro de **Ĝangalo**, de **Monato** kaj de **Esperanto**, traktata per programo nomata *Wordsmith Tools*.

Brazilei: Via magistra disertaĵo malfermas gravan vojon al lingvaj esplorserĉantoj. Kiel oni povas aliri ĝin? Ĉu vi intencas eldoni ĝin papere?

Emerson Werneck: Ĝi estas alirebla per la adreso: http://bdt.d.bce.unb.br/tesdesimplificado/tde_busca/arquivo.php?codArquivo=2304. Sed mi ankaŭ intencas surpaperigi ĝin, ĉar, por kelkaj homoj, estas malfacile legi longan verkon sur ekrano.

Brazilei: Neologismo koncernas ĉiujn lingvojn, sed ĝia difino povas iom varii de unu lingvo al alia. Laŭ vi, kiu difino plej trafe priskribas tiun fenomenon en Esperanto?

Emerson Werneck: La difino de “neologismo” estas lingvistika koncepto, kaj do ĝi ne varias laŭ la lingvo, sed laŭ la lingvistika vidpunkto. Certe la plejparto de la parolantaro de ĉiu lingvo konas plej bone unu aŭ du tiajn difinojn, sed tio ne signifas, ke la koncepto estas malsama en ĉiu lingvo, sed nur ke iu difino estas la plej konata. Ekzemple, en Esperantio oni plejparte kredas, ke “neologismo” estas nur vortformado kun nova radiko, sed tio tute ne estas la plej bona difino de neologismo por Esperanto aŭ por alia lingvo. “Neologismo” estu ĉiu nova vorto, sendepende de la mekanismo de ĝia formado, ankoraŭ ne oficialigita, eĉ se jam leksikografita (registrita en vortaro). Kiel referenco pri la noveco de neologismoj en Esperanto, oni prenu la jaron de la eldono de la unua Plena Ilustrita Vortaro (PIV), de Wahringhien, tio estas, 1970. Tiuokaze, ni facile konstatas, ke Esperanto havas centojn da neologismoj, kaj tio estas pruvo, ke ĝi estas vigla, vivanta lingvo. Do, finfine, “neologismoj” ne estas “malamikoj” de la “bona lingvo”, sed kontraŭe. Nur parto



de la neologismoj devus esti zorgeme traktata: la neologismoj de formo, tio estas, la vortoj kun novaj radikoj. Ili ekzistas en ĉiu lingvo, kaj riĉigas la leksikonon, sed por internacia lingvo, gravas konservi la leksikonon relative malgranda. Kiel lingvisto, mi ne estas kontraŭ iu ajn tipo de neologismo, mi nur observas ĝian kreadon; sed kiel esperantisto, mi kredas, ke oni povas pliriĉigi la lingvon preferinde uzante la jam ekzistantajn radikojn.

Brazilei: Ĉu oni komprenu per tio, ke ĉiuj vortkunmetoj jam kreitaj aŭ kreotaj, el oficialigitaj radikoj, estas, laŭ lingvistika vidpunkto, ankaŭ neologismoj? Alidirate, ĉu kunmetaĵo kia ‘hejmemulo’ estu konsiderata neologismo, malgraŭ tio, ke ĝiaj apartaj elementoj estas oficialigitaj?

Emerson Werneck: Bonega demando! *Lato sensu* oni ja povas diri, ke ĉiu nova kunmetaĵo estas neologismo. Sed praktike, oni konsideras kiel “neologismon” nur la vortojn kiuj kunportas novan koncepton, ekzemple, “koramiko”, “ĉasaviadilo”, “bombaŭto” aŭ “pentuvio”. Vortoj kiel “hejmemulo” estas nur normalaj antaŭvideblaj kunmetaĵoj, kaj do eĉ ne bezonas esti vortarigitaj. Ili ne estas neologismoj en la strikta senco.

Brazilei: Laŭ viaj esploroj, kiu(j) fonto(j) plej multe kontribuis por la riĉigo de la esperanta vortaro?


Emerson Werneck: Laŭ mia sperto — sed tio ne montriĝas en mia disertacio — la plejmulto de la riĉigo de la esperanta vortaro venis aŭ venas de la verkoj de malmultaj, sed vaste legataj aŭtoroj. Sed verdire ili nur sugestas vortojn, kaj la geparolantoj decidas uzi ilin aŭ ne, do, en la fino, estas la geesperantistoj, kiuj decidas, kiuj novaj vortoj eniros la lingvon. Alia grava fonto estas la interreto, kie ekzistas, ekzemple la diskutlisto (“Tradukado”), de kie ĉiutage elvenas multaj novaj vortoj, ne necese, kun novaj radikoj. →

Brazilei: Neoficialaj afiksoj estas pli multnombraj ol tiuj oficialaj. Malgraŭ tio, ke ili estas proponataj ĉefe por fakaj medioj, oni pli kaj pli ekuzas ilin en ordinaraj tekstoj. Al kio vi atribuas tiun sendistingan uzadon de tiaj vorteroj?

Emerson Werneck: Al la viveco mem de la lingvo! Se la esperantistaro decidas ofte uzi neoficialajn afiksojn, tio signifas, ke ili estas konsiderataj kiel utilaj, bezonataj vorteroj. Oni ne bezonas zorgi multe pri la uzado de tiuj eroj. Se iam la komunumo decidos, ke ili ne plu estas bezonataj, ili nature eliros la lingvon. La geparolantoj estas suverenaj en tiu kampo — Nur ili decidas, kiuj vortoj daŭros ene de la lingvo.

Brazilei: Ĉar Esperanto estas relative juna lingvo, elstaraj esperantistoj povas sin konsideri veraj kunkreantoj, proponante solvon por multaj vortoj ankoraŭ bezonataj en ĉiaj sferoj de homagado. Laŭ via opinio, ĉu tiaj aktivaj lingvouzantoj ne riskas senti la lingvon pli sian ol ordinaraj uzantoj sentas ĝin?

Emerson Werneck: Denove bonega demando! Ni ja riskas, ke tiaj spertaj lingvouzantoj sentu la lingvon kiel sian kreaĵon, sed tio ne estas danĝera al la lingvo mem, ĉar la aliaj uzantoj, kolektive, estos finfine tiuj, kiuj decidos pri la taŭgeco aŭ ne de la novaj vortoj kreitaj. En ĉiu lingvo, oni devas krediti multon de la vortstoko al la plej kleraj uzantoj de la lingvo, sed neniam la vortoj povas esti altrudataj al la aliaj uzantoj. La nova norvega lingvo ŝuldas multon al la laboro de nur unu homo, sed la fakto estas, ke la norvegaparolantoj kolektive akceptis la uzadon de la novproponitaj vortoj.



Brazilei: Vi skribis, ke la simpleco de vortfarado en Esperanto ne ĉiam signifas facilecon por lernado de la lingvo. Ĉu tio signifas, ke facilaj legolibroj, kiel *Gerda Malaperis!*, povas enteni verajn lingvajn kaptilojn por komencantoj?

Emerson Werneck: Alia trafa demando! Tio signifas, ke la lernado de Esperanto pere de libroj, facilaj aŭ ne, devus esti akompanata de gvidanto pli sperta. Nur tre malofte memlernantoj fariĝas bonaj parolantoj. Mi kredas, ke la movado devus, antaŭ ĉio, zorgi pri la preparado de instruistoj de E-o.

Brazilei: Dum (AdE) streĉas la risorton de sia vortaro per oficialigo de fundamenta vortstoko, la esperantistaro tute malstreĉe dikigas la vortarojn... Ĉu oni ne riskas, per tiu konstanta kaj kreskanta invado de novaj vortoj, iom forigi tiun senton pri fremdeco, kiun havigas neologismo?

Emerson Werneck: La fremdeco de neologismoj estas en malrekta proporcio kun la kono de aliaj lingvoj far la parolantoj. Ĉar la novaj vortoj, eĉ se kun novaj radikoj, devenas ĝenerale de jam internaciigitaj fontoj, ideale, ili reflektos la konon de la parolantaro pri aliaj lingvoj, nuntempe precize de la angla, ekzemple. Ne temas pri risko. Ne necese neologismoj devas ŝajni fremdaj.

Brazilei: Pro malobeo al regulo de vorto-farado, oni jam provis eŭropigi la lingvon per vortoj kiaj 'evolucio', 'polucio' k.m.a., anstataŭ la plej ĝustaj 'evoluo', 'poluo'... Ĉu vi opinias, ke jam estas tempo por starigo de ia minimuma kriterio por esperantigo de fremdaj vortoj, ĉefe koncerne proprajn nomojn, cele eviti importadon de personaj lingvaj sentoj?

Emerson Werneck: Mi opinias, ke oni bezonas regulojn por la esperantigado de propraj nomoj. Sed por aliaj vortoj, lasu, ke ni, la esperantistaro, decidu, laŭ la uzado, kiuj formoj estas la plej ĝustaj. Kontraŭe, oni riskas tro multobligi la vortotrezoron de Esperanto, ĉar individuaj preferoj sin reflektus en la vortstoko. Sed, ankoraŭfoje, se la plejparto de la esperantistaro preferos la plej eŭropecajn formojn, ekzemple, tien iros la evoluo de la lingvo. Oni ne povas, pere de leĝo, altrudi al la parolantoj pli preferindajn vortojn.

Brazilei: Krom Esperanto, vi estas instruisto ankaŭ pri la angla kaj la japana. Ĉu viaj lernantoj iom profitas el via sperto kiel lingvisto aŭ vi tute apartigas vian instruagadon disde via sciencagado?

Emerson Werneck: Mi klopodas uzi mian sciencajn sperton por faciligi la instruadon de kelkaj lingvaj aspektoj, sed mi ne certas, ĉu mi sukcesas tion pli ol la aliaj instruistoj, kiuj ne tion faras. Tio, kion mi scias estas, ke miaj lernantoj tuj lernas kiel demandi – kaj tio estas la plej grava

por ilia lernada evoluo. Se oni scias, kiel demandi, oni lernas pli rapide ol tiuj, kiuj simple ripetas aŭ konstruas frazojn, ekzemple.

Brazilei: Laŭ via opinio, kiu estas la plej (mal)facile lernebla lingvo?

Emerson Werneck: Tio dependas de la lingvo de la lernanto. Por la parolantoj de la portugala, mi kredas, ke la mandarena estas la plej malfacile lernebla, ĉar ekzemple ĝi havas tonojn, kaj ideogramojn, kaj Esperanto la plej facila, pro la simileco de la vortstoko kaj la gramatiko.

Brazilei: Laŭ vi, kiel tekstus la 17-a regulo por kursgvidantoj?

Emerson Werneck: La demandoj devas esti instruataj laŭeble plej tuje en la kurso, ĉar ili akcelas la lernadon de aliaj strukturoj.

Mi dankas al vi pro la eblo diskuti tiujn lingvajn aspektojn en la revuo, kaj akceptas komentariojn kaj aliajn demandojn per happax@superig.com.br



Ed & Pris – Eder Benedetti



La Sekcio Interne

En la unua sesmonato de 2008 la Sekcio partoprenis en kvar E-aranĝoj, tri en ŝtato San-Paŭlo (SP) kaj unu en ŝtato Rio (RJ).

★ *Regiona Renkonto de Esperanto (la 19an - 20an de januaro)*

La du-taga evento okazis en la urbo Bauru/SP, sub organizado de la agema grupo Baurua Esperanto-Societo kaj kultura apogo de Centro Hermes por Supera Edukado, kiu disponigis la renkontiĝejon. Krom deĵorado ĉe sia tradicia budo, la Sekcio regalis la ĉeestantojn per multmedia prezento de la temo “Kiel virtuale akceli lingvolernadon per principoj de rolludado”.

★ *71-a Renkonto de Esperanto en la Paraiba Valo (marte la 30an)*

Tiu tradicia evento ĉi-jare okazis en la urbo São José dos Campos/SP, sub aŭspicio de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj de la loka universitato UNIVAP. La eventon organizis Eni Alvim de Oliveira, serĉesploristino ĉe Nacia Instituto pri Spacesplorado (INPE) en tiu urbo. El la naŭ diversstemaj prelegoj, unu estis prezentata nome de la Sekcio. La temo proponata estis “Didaktika virtuala itinero por kursgvidantoj kaj lernantoj de Esperanto”. Bedaŭrinde, pro tempopremo kaj problemoj en la konservado de la multmedia dosiero, la prezentado draste reduktiĝis.

Kiel kutime deĵorado ĉe la budo okazis dum la tuta evento.

★ *19-a Esperanto-Renkontiĝo de ŝtato Rio (la 17an - 18an de majo)*

La du-taga evento, organizita de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro kaj de Tririvera E-Klubo, okazis en la



Bauru - Foto: Eni Oliveira



Tririveroj - Foto: Neide B. Régio

Ŝtata lernejo *Condessa do Rio Novo*, en la urbocentro de Tririveroj/RJ. Al la varia programo konsistanta el prelegoj, studhoroj, debatrondoj, libera forumo, filmo-prezentado k.a. aldoniĝis du prelegoj prezentataj nome de la Sekcio pri la temo “La Komuna Eŭropa Referenckadro kaj la loka E-grupo: adaptiĝo cele al unueca lingvotestado”. Dum la tuta evento okazis deĵorado ĉe la sekcia budo, kiu prezentis la novajn importitajn erojn, inter kiuj la plenkolora memorilo *Poŝamiko* kaj la bildrakonta albumo *Rat-Man*.



★ 20-a Esperanto-Renkontiĝo de la Urbo San-Paŭlo - ERUSP (la 22an de junio)

Ĉi-jare Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, organizanto de la evento ERUSP, dividis kun Brazila Sekcio de ILEI la tagon kaj sidejon de USE-Santana (Unuiĝo de Spiritismaj Societoj en la Ŝtato San-Paŭlo), kiu situas en la norda parto de la urbo. Posttagmeze ĉirkaŭ 80 homoj ĉeestis la eventon ERUSP, kaj matene 20 instruemuloj partoprenis en la kunveno de la Sekcio, kie debatiĝis la temo “Enlanda kaj Internacia Ekzamenoj: du apartaj mondoj”. La kunvenantoj estis regalataj per la broŝuro “La Komuna Eŭropa Referenckadro – Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj”, redaktita de Katalin Kováts kaj eldonita de UEA – regalanto de la broŝuro. La ceteraj membroj, kiuj ne povis ĉeesti la kunvenon ricevos hejme ekzempleron de la broŝuro, kune kun ĉi tiu n-ro de Brazilei.

Dum la tuta evento okazis deĵorado ĉe la sekcia budo, kiu prezentis al la ĉeestantoj la novajn importitajn erojn, inter kiuj la nemalhavebla *Manlibro pri Instruado de Esperanto* kaj la furora memlernilo laŭ rekta metodo *Saluton!*.



Utiligo de bildstrioj kursoj en lingvaj

Joseo Tenorjo

3-a kaj lasta parto de la artikolo
"Valoro de bildliteraturo en
lernoĉambro"

Kiel jam montrite en antaŭaj partoj de tiu ĉi artikolo, plej ordinara utiligo de bildarto en lingvaj kursoj evidentiĝas en multaj lernolibroj mem, kies aŭtoroj trafe esploras la grafikeblecojn de karikaturaj.

Ni revenu al pasinteco por rekonatiĝi kun du avangardaj lerniloj, verkitaj de la hungaro Ferenc Szilágyi kaj eldonitaj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en la 1960-aj jaroj: "*Curso práctico de Esperanto*" (Praktika kurso de Esperanto), adaptita de Ismael Gomes Braga por portugallingvanoj,




Oscar Jacobson

kaj “Ellernu! – Progresiga kurso de Esperanto”. Indas memorigi, ke en la unua supre menciita lernilo enestas bildserio de la simpatia komiksulo Adamson – kreaĵo de la sveda karikaturisto Oscar Jacobsson (1889-1945) –, kiu per si mem allogas kaj plaĉas. La abundo de tiaj ilustraĵoj en ambaŭ lerniloj havas specifan celon, nome estigi per ĉiu bildo kiel eble plej multajn demandojn.

Bild(stri)oj aperas en prestiĝaj porenir-fakultataj ekzamenoj en pluraj landoj. En Brazilo jam de jaroj ili enestas ne nur en tiaj superaj ekzamenoj, sed ankaŭ en tiuj celantaj enlandajn publikajn mezlernejanajn. Ankaŭ la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI postulas de siaj kandidatoj (de ambaŭ niveloj) parolan lertecon klarigi bildsituaciojn laŭ originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al demandoj de la ekzamenantoj. Se oni opinias, ke bildstrioj estas triaranga legaĵo, estas konsilinde, ke oni legu multajn bildrakontojn antaŭ ol skribi unu el tiuj ekzamenoj!

Kiel jam skribite, la tria parto de tiu ĉi artikolo iom esploras la praktikan flankon de la temo. Sekvas kelkaj sugestoj por utiligo de bildstrioj en lernoĉambro. Mankas indiko pri tio kia(j)n lingva(j)n nivelo(j)n celas la proponataj aktivaĵoj per bild(stri)oj. Tio estas intenca por ke vi pli libere adaptu la sugestojn al la bezonoj de viaj kursanoj. Uzu ŝpareme la ludojn, eventuale kiel ‘varmiĝon’ komence de lecionoj. Agrablajn aktivadojn!



TRADUKADO



AKTIVAĴO 1

Materialo bezonata: bildstrioj (malnovaj dimanĉaj gazetoj estas abunda fonto!) kaj vortaro.

- 1 Elektu kelkajn popularajn bildstriojn, kies gramatika enhavo plej proksimas al la lingva nivelo de la lernantoj. Eltondu ilin.
- 2 Enklase disdonu la bildstriojn kaj petu, ke la lernantoj elektu po unu el ili laŭ siaj preferoj.
- 3 Laŭ la kiomo da lernantoj, proponu unuopan aŭ komunan tradukon de la elektitaj bildstrioj.
- 4 Skribu surtabule la tradukojn, reliefigante la bonajn solvojn kaj korektante eventualajn misojn (gramatikajn kaj leksikajn).

VERKADO



AKTIVAĴO 2

Materialo bezonata: bildstrio, viŝinko, kopiilo.

- 1 Forviŝu parton de la originala teksto per blanka viŝinko (Se en la bildstrio enestas du parolvezikoj, ekzemple, forviŝu la tekston de unu el ili). Poste traduku la restantan parton de la teksto.
- 2 Multobligu la ŝanĝitan bildstriojn.
- 3 Disdonu la bildstriojn kaj petu, ke la lernantoj, unuope aŭ grupe, elpensu parolon por la blanka parolujo.
- 4 Korektu surtabule la proponitajn paroltekstojn, kunelektu la plej kreeman kaj poste prezentu la originalan tekston.



Rimarko: por progresantaj lernantoj, vi povas forviŝi la tekston de ĉiuj parolvezikoj kaj proponi, ke ili elpensu tute novan interparoladon.

RAKONTADO

AKTIVAĴO 3

Materialo bezonata: bildserio (enhavanta pli ol kvin bildkadrojn) kun aparta teksto, kartono, gluo, tondilo kaj kopiilo.

- 1 Multobligu la bildaron laŭ dezirata kvanto, gluu ĝin sur kartono kaj poste distondu ĝin.
- 2 Antaŭ ol disdoni la bildkartaron al la lernantoj, malordigu ĝian sinsekvon kaj petu, ke ili reordigu la kartaron, kreante sian propran version de la rakonto.
- 3 Proponu, ke ĉiu parole prezentu sian version de la rakonto – la lernanto prenas unu bildokarton kaj montras ĝin al ĉiuj dum li parolas; poste li prenas alian karton kaj daŭrigas la rakontadon ĝis la lasta bildokarto.
- 4 Post kiam ĉiuj rakontis sian version, proponu, ke ili, laŭvice, rerakontu la version de sia apuda sidanto (aŭ de alia rakontinto laŭ via elekto). Rerakontado fare de aŭskultintoj celas konstati ĉu ili atentis la rakonton!
- 5 kunelektu la plej kreeman rakonton kun eventualaj komentoj pri la interesaj argumentoj.
- 6 Prezentu la originalan version laŭ formo de diktado.

DEMANDADO

AKTIVAĴO 4

Materialo bezonata: sen-teksta elvokiva bild(stri)o.

- 1 Listigu aparte vortojn kaj esprimojn eventuale ankoraŭ nekonatajn de la lernantoj por disdoni al ili antaŭ montri la bildon.

2

Listigu kiel eble plej multajn demandojn pri la bildo. Dividu la demandaron en du partojn: la unua parto koncernu la bild(stri)on mem kaj la dua parto koncernu la intereson de la lernantoj pri la temo. Tiu ĉi rimedo bonefikas en tiaj okazoj, kiam oni volas plilongigi demandaron sen risko de enuigo. Vidu specimenon en la suba teksto-fenestro.

La apuda bildo aperis en reklamo de asekurkompanio. Sekvas specimenoj de demandaro cele paroligi kursanojn.

Pri la bildo mem:

1. Kia homo estas la stiristo?
2. Kiun luktarton supozeble li praktikas?
3. Kiel reagas la kunveturanto?
4. Kiel reagas la gardanĝelo?
5. Kiel aspektas la ŝtelisto antaŭ la reago de la stiristo?
5. Laŭ via opinio, kies gardanĝelo ĝi estas? (...)

Por la lernantoj:

1. Ĉu vi stiras?
2. Kia stiristo vi estas?
3. Ĉu via aŭto estas asekurita?
4. Ĉu vi praktikas iun luktarton?
5. Por kio homoj praktikas tiajn luktartojn?
6. Ĉu vi jam spertis priŝtelon?
7. Kiel vi agus en tia situacio?
8. Asekurkompanioj reklamas: "Se via aŭto estas asekurita, vi havas nenian motivaĵon por malhelpi ŝteliston". Ĉu vi opinias, ke tio kuraĝigas ŝtelistojn? (...)



Spacca

LUDADO



AKTIVAĴO 5

Materialo bezonata: bildstrioj kun du roluloj, kartonoj, skribiloj kaj tondilo.

- 1 Disdonu la bildstriojn kaj petu, ke la lernantoj duope sin preparu por skeĉludi laŭ la elektita bildstrio. (Prezentu diversajn opciojn de bildstrio por ke ili elektu laŭ siaj personecoj.)
- 2 Petu, ke ĉiu ludanto skribu grandlitere siajn parolojn sur kartonfolio kaj poste eltondu ĝin laŭ formo de parolveziko.
- 3 Voku laŭvice la parojn por skeĉludi. Ĉiu ludanto tenu antaŭ si la parolvezikon de sia kunludanto cele memorigi lin/ŝin pri la teksto. Dum ludado, ne interrompu ilin. Ĉe la fino, proponu eventualajn plibonigojn (prononcon, entonacion...) kaj petu, ke ili ripetu ĝin. Laŭeble proponu trian ripeton, sed ĉi-foje sen la helpo de la kartonaj parolvezikoj.

SONIMITADO



AKTIVAĴO 6

Materialo bezonata: listo de besto-krioj, bildoj de tiuj bestoj, kopiilo, papero kaj skribilo.

- 1 Multobligu la liston de besto-krioj kaj aranĝu la besto-bildaron po unu-du bildoj paperfolie.
- 2 Enklase, sidigu la lernantojn cirkle. Lasu la besto-bildaron en la centro kaj disdonu la liston de besto-krioj.
- 3 Proponu, ke ili elektu 2-3 bildojn kaj aldonu al ili la koncernan besto-krion kun iu grafikefekto.
- 4 Laŭoportune petu, ke ili provu imiti la besto-kriojn.

AKTIVAĴO 7

Materialo bezonata: listo de besto-krioj, papero kaj skribilo.

- 1 Disdonu liston de besto-krioj al la lernantoj.
- 2 Proponu, ke ili verku frazojn esplorante la elvokivon de besto-krioj. Donu kelkajn ekzemplojn por ke ili komprenu la proponon: 'La bebo kvake ploris'. 'La avinjo pepe ridetis'. 'Mi apenaŭ komprenas kion li diras: li gruntas!'
- 3 Se inter la kursanoj troviĝas iu desegnemulo, proponu, ke li/ŝi ilustru la frazojn (kaj sendu kopion al ni!).

Besto-krioj

Ansero gakas, **anaso** kvakas, **birdo** kvikas, **bovo** muĝas, **ĉevalo** henas, **hundo** bojas/jelpas, **kapro** mekas, **kato** miaŭsas/ronronas, **kokino** klukas, **koko** kokerikas, **kokido** pepas, **kolombo** kveras/rukulas, **korvo** grakas, **kukolo** kukuas, **leono** roras/blekas, **Lupo** hurlas/hululas, **muso** cincas, **muŝo** zumas, **najtingalo** kantas, **pasero** pepas, **porko** gruntas, **rano** kvakas, **ŝafo** beas, **serpento** siblas, **strigo** ululas.



Bildrakontoj montras sian utilon nacilingve

FAMAJ BRAZILAJ ELDONEJOJ LANĈAS KLASIKAĴOJN BILDRAKONTE

El kelkaj bildrakontoj lanĉitaj pasintmonate, du estas adaptaĵoj de brazilaj ĉefverkoj, nome “*Triste Fim de Policarpo Quaresma*” (Povra Vivfino de Policarpo Quaresma), de Lima Barreto (1881-1922), kaj “*Memórias de um Sargento de Milícias*” (Memoraĵoj de Miliculo), de Manuel Antônio de Almeida (1831-1859). Ambaŭ adaptaĵojn desegnis Lailson H. Cavalcanti, kiu ankaŭ aŭtoras la bildrakontojn “La Luzidoj”, de la portugala klasikulo Luís Vaz de Camões (1524? - 1580), kaj “La Alienisto”, de la renoma brazilano Machado de Assis (1839-1908).

La kreskanta intereso pri tiaj bildrakontoj estas rezulto de eldoneja strategio celanta instigi lernejanojn al legado de klasikaĵoj, kadre de la projekto “Brazilia Literaturo per Bildrakontoj” lanĉita en 2006.

La plej populara bildrakonta adaptaĵo (kun tri versioj jam aperintaj ekde la lanĉo de la projekto) estas tiu bazita sur la fama verko de Machado de Assis, **La Alienisto**, cetere jam tradukita al Esperanto. La rakonto montras kuraciston, fine de la 17-a jarcento, kiu iom post iom submetas la tutan loĝantaron de pacama landinterna urbeto al siaj psikologiaj avangardaj esploroj pri la limo inter frenezo kaj racio.



BILDRAKONTO PRI HOMEKSTERMO POR GERMANAJ LERNEJANOJ

Ĉiu lando havas nekuraceblajn vundojn. Brazilo ankoraŭ inkubsonĝas pri la jaroj de militista diktaturo. Ankaŭ Germanio havas siajn vundojn, ĉefe tiun pri homekstermo fare de nazianoj.

Malkiel Brazilo, tamen, kiu insistas kaŝi la nigrajn paĝojn de sia historio, Germanio klopodas havigi al siaj lernejoj kompletajn informojn pri tiu nigra periodo de sia historio.

Sed por rememorigi temon tiel delikatan necesas speciala didaktika ilo. *Centro Anne Frank*, en Amsterdamo, invitis la nederlandan kartuniston Eric Heuvel krei specialan bildrakonton pri la temo por la germanaj lernejoj. La verko, nomata *Die Suche* (La Serĉado), rakontas pri juda knabino loĝanta en Nederlando dum la nazia epoko. Monsubtenata de la germana registaro, komence la verko estos uzata en kelkaj lernejoj en Berlino. Se la instruistoj aprobos la projekton, la bildrakonto estos adoptita en ĉiuj publikaj lernejoj. Jen pruvo pri la utilo de bildrakonto, kiu povas prezenti plej delikatajn temojn pli efike ol tradiciaj lernolibroj.

Fonto: www.mucufu.blogspot.com




Antaŭ kelkaj semajnoj, konsultante la bibliotekon de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, mi trovis plian bildrakontan juvelon eldonitan de Hungara Esperanto-Asocio en 1978. Temas pri adaptaĵo de la verko “La filoj de l’ ŝtonkora homo”, de la hungara klasikulo Mór Jókai. La bildrakonton verkis Vilmos Benczik kaj desegnis Pál Korcsmáros.

PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

Edson Ponciano

La usona arkeologo kaj esperantologo Bernad Golden verkis la novelon, el kiu estas prenitaj la vortospecimenoj por la ĉi-numera taksilo. La 96-paĝan novelaron “Hierau, hodiaŭ, morgaŭ” eldonis La Laguna: TK/Stafeto, Antverpeno en 1982. Eksakademiano (fako vortaro), Golden abunde verkis artikolojn, recenzojn, beletraĵojn kaj tradukaĵojn en multaj esperantaj periodaĵoj. Kontrolu sur la sekva paĝo, la rezulton de via memtaksado.



1. Klaĉi – A: elbuŝe ĵeti salivon; B: maljuste fari ĝenetojn al iu; C: disportadi malicaĵojn dum babilado; Ĉ: moke aŭ malice ridaĉi.
2. Sakri – A: apartigi de komuna uzado cele religiservon; B: perforte forpreni ies posedaĵojn; C: donacii al diaĵo por akiri alion; Ĉ: esprimi koleron per blasfemaj vortoj.
3. Kruta – A: koncerna al malvasta kaverno; B: prezentanta deklivon forte klinitan; C: rilata al solidiĝinta parto de terglobo; Ĉ: konservanta sian primitivan staton.
4. Dresita – A: rilata al io metita laŭ ĝusta ordo; B: tia, kia oni ĝin edukis por iu celo; C: kovrita per ŝtofoj aŭ peltoj cele kaŝi nudecon; Ĉ: stato de maŝino mekanike haltigita.
5. Faŭko – A: rabobirdo prezentanta denton ambaŭflanke de beko; B: kvanteto da likvaĵo staranta en surfaca kavo; C: vira vesto karakterizata per siaj postaj baskoj; Ĉ: minaca buŝkavo de rabaj bestoj.
6. Fasko – A: aro da longformaj aĵoj kuntenataj; B: parto, ĉe striktaj vestoj, kiu subalie pendas; C: ano de gento inter Hispanio kaj Francio; Ĉ: boteleto por parfumoj.
7. Klapo – A: peco artikigita en unu fino kaj svingebla en alia; B: klakrapo de la manoj cele montri aprobon; C: bastono pli dika ĉe unu ekstremaĵo ol ĉe alia; Ĉ: papera folieto por notaĵoj.
8. Pleto – A: regula interkrucigo de fadenformaj aĵoj; B: ligna plato por alporti telerojn; C: parolo antaŭ juĝisto cele defendi klienton; Ĉ: speciala felo uzata por vestfarado.
9. Rande – A: laŭgrade en difinita hierarkio; B: per apartigo kaj kunigo laŭ speco aŭ destino; C: ĉe ĉirkaŭa parto de surfaco de aĵo; Ĉ: en maniero pli-malpli simila al cirklo.
10. Stumpe – A: sur ŝtona plato uzata por supreniri; B: per teksaĵo el kiu oni faras vestojn; C: je mallonga parto restanta el io; Ĉ: en vesto celanta kovri la piedojn.

1. **Klaĉi** – [C] disportadi malicaĵojn dum babilado. “*Oni klaĉas, ke li subtenis ...*” (p. 67) [Opcio A = kraĉi]; [Opcio B = ĉikani]; [Opcio Ĉ = rikani].
2. **Sakri** – [Ĉ] esprimi koleron per blasfemaj vortoj. “*Sterkaj stultuloj sakris Stanislaw.*” [p. 77] [Opcio A = konsekri]; [Opcio B = rabi].
3. **Kruta** – [B] prezentanta deklivon forte klinitan. “*... la kruta flanko de la monteto.*” (p. 6) [Opcio A = grotaj]; [Opcio C = krusta]; [Opcio Ĉ = kruda].
4. **Dresita** – [B] tia, kia oni ĝin edukis por iu celo. “*La bone dresitaj armeaj ĉevaloj staris ...*” (p. 41) [Opcio A = aranĝita]; [Opcio C = vestita]; [Opcio Ĉ = bremsita].
5. **Faŭko** – [Ĉ] minaca buŝkavo de rabaj bestoj. “*Fermu vian faŭkon, azenaĉo!*” (p. 24) [Opcio A = falko]; [Opcio B = flako]; [Opcio C = frako].
6. **Fasko** – [A] aro da longformaj aĵoj kuntenataj. “*... direktante la lumfaskon de sia lampo ...*” (p. 10) [Opcio C = vasko]; [Opcio Ĉ = flakono].
7. **Klapo** – [A] peco artikigita en unu fino kaj svingebla en alia. “*... la stivistoj fermis la ferdekan klapon, lasante ...*” (p. 76) [Opcio B = aplaŭdo]; [Opcio C = klabo].
8. **Pleto** – [B] ligna plato servanta por alporti telerojn k.s.. “*... skatoloj, korboj kaj pletoj malaperis, kaj ...*” (p. 21) [Opcio A = plekto]; [Opcio C = pledo].
9. **Rande** – [C] ĉe ĉirkaŭa parto de surfaco de aĵo. “*...plenigis la botelon ĝisrande per akvo.*” (p. 58) [Opcio A = range]; [Opcio Ĉ = ronde].
10. **Stumpe** – [C] je mallonga parto restanta el io. “*... fumi cigaredojn, unu post alia ĝisstumpe, tute ne ...*” (p. 77) [Opcio A = ŝtupe]; [Opcio Ĉ = ŝtrumpe].

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre benzonas legi iom pli.

3 — 4: **kontentiga**; 5 — 7: **bona**; 8 — 10: **bonega**

DIDAKTIKE KAJ KREEME PER POEMOJ

Per interreto ni ricevis interesan materialon senditan de Esperantisto el la urbo Nova Iguaçu, en Rio. Temas pri sonetaro, en la portugala, pri Esperanto celanta ties diskonigon kaj intruadon per poemoj. Ĝin verkis Vitor Mendes instigata de sia patro, la sonetisto Luiz Mendes.



Vitor eklernis Esperanton en 1982, kiam li estis 14-jara, ĉe s-ino Liriam Tabosa kaj daŭrigis la lernadon ĉe s-ino Jovelina, jam forpasinta. Ravita pri la lingvo, li korespondadis kun homoj el diversaj landoj, ĉeestis plurajn E-aranĝojn kaj dum ĉirkaŭ dek jaroj instruis Esperanton en spiritisma societo, kie li konatiĝis kun la lingvo. Pro transloĝiĝo al la urbo Petrópolis, ankaŭ en Rio, kaj pro fakultataj studoj, li bezonis iom retiriĝi de la movado, sed revenis post dek jaroj unue per interretaj kontaktoj. Nuntempe li kaj kelkaj samideanoj ekfondas la grupon NIEK – Nova Iguaçu Esperanto-klubo.

Kelkaj lecion-sonetoj plaĉe distingiĝas pro la didaktika enhavo trafe prezentata. Alidirate, Vitor ekverkas poeme cele mildigi la rigoron de gramatiko. Por via ĝuado ni elektis specimenon de lia kreemo, kiu pritraktas participojn.

Quem no Esperanto faz alguma ação
'Faranto' é, quem fez, já é 'farinto'
'Faronto', então serei, creia, não minto,
Do Esperanto real divulgação.

E tal divulgação será '*farota*'
E após fazê-la ei-la então '*farita*'.
'Faronto' eu? Não mais!! minh'alma grita
Agora sou '*faranto*' gota a gota!

A obra do Esperanto divulgar
É coisa que não posso mais deixar;
Coisa '*farata*' em cada vão momento!

E mesmo em poesia vou falar,
Pro mundo todo se comunicar
Pelo Esperanto em puro sentimento...

Interesatoj legi pliajn lecion-sonetojn, kontaktu rekte la aŭtoron per vitoesperanto@hotmail.com

Kromlecionoj

POR ENUIGITAJ LERNANTOJ

La akademiano Prof. Geraldo Mattos memorigas nin (IPR 2/00) pri tio, ke “...gramatiko estas nur skafaldo, kiun masonisto malmuntas post la konstruo, nur lambastono, kiun akcidentito ĝoje forĵetas, kiam li jam povas paŝadi senĝene... Gramatikon ni utiligas, dum ni lernas, kaj poste ni povas ĝin tute forgesi, sen ia plej malgranda perdo!”. Laŭ tiu kunteksto, ni povas imagi lernoĉambron kiel malsanulejan ĉambron, en kiu la celo de instruanto estu restigi sian lernanton kiel eble plej mallonge en tia medio... Sed kion povas preskribi instruanto al instruato jam kapabla iom paŝadi proprapiede? Nia kunlaboranta membro (kaj cetere kuracisto!) Paulo Sergio Viana, el la urbo Lorena/SP, de kelkaj monatoj preskribas jenan aktivadon por siaj gramatiko-lernintoj: subĉiela leciono! Legu mem liajn raportetojn pri jam okazintaj tiaj renovigaj lernekskursoj.



*Subĉiela leciono sur
"Ŝtono Marcela" (1830
metrojn super marnivelo!)
en la urbo Cunha/SP.
La instruanto Paulo
Viana uzas la verdan
tabulon de la naturo
por malenuigi sian
lernanton Alexandre*



*Prado. Li garantias, ke ili eĉ dum minuto ne krokodilis... Nova
suprenirado al tiu monto, kun pli da gramatiko-lernintoj, jam
estas programita por la dua sesmonato ĉi-jara.*

SUBĈIELAJ LECIONOJ – ĈU VI JAM PENSIS PRI TIO?

Paulo S. Viana



Eĉ plej idealismaj pedagogoj scias, ke vera lernado estas peniga, laciga, iamaniere malagrabra laboro. Tiel ke la revo de ĉiu instruisto estas trovi instrumentodon plene plezurigan. Ĉi tio estas preskaŭ neebla, ĉar cerba laboro por akirado de konoj estas ĉiam cerbelĉerpa.



Sekve, instruistoj kontentiĝas, se ili nur sukcesas mildigi la suferojn, dum siaj lecionoj. Tiucele, multajn rimedojn oni jam provis: ludoj, dramoj, muziko, ŝercoj, do ĉiaspeca ĵonglado.

En Esperantujo, oni apenaŭ vidas unu el tiuj rimedoj, kiu ŝajnas tre efika: subĉiela leciono. Pri tio mi volas raporti al vi nian sperton ĉe Esperanto-klubo, en Lorena/SP. Por malenuigi nian konversacian klason, ni decidis plani vizitojn al proksimaj vidindaĵoj – kun triobla celo: lerni novajn vortojn, ĝui klerigan turismon kaj... amuziĝi. Kompreneble, ne ĉiusemajne oni organizos subĉielan lecionon, sed ĉiun duan monaton, proksimume.



La unua vizito okazis en sabata posttagmezo, kiam nia grupeto vizitis la Bazilikon de Nia Sinjorino Aparecida, en ĉi tiu proksima, konata urbo. Ni ĉiuj promesis eviti krokodiladon. Unu el ni portis la Esperantan flagon. Ni vizitis la templon mem, la apudan muzeon kaj la bazarcentron. La etoso estis gaja kaj kamaradeca. Ni ĉeestis parton de meso, faris multajn fotojn kaj bonguste lunĉis. Ĉiuj plene ĝuis la lecionon.

Tamen... ĉu leciono aŭ nur promeno?

Kontrolu: unu el ni antaŭe vizitis la retejon de la sanktejo kaj prezentis al la grupo la historion, la informojn pri arkitekturo kaj kuriozajn faktojn pri tiu grava pilgrimejo. Rilate lingvan lernadon, la grupo lernis plurajn aferojn:

1. distingo inter jenaj vortoj: kapelo, preĝejo, ĉefpreĝejo, katedralo, baziliko, sanktejo;
2. novaj vortoj rilate konstruaĵon: briko, tegolo, kupolo, turo, navo, altaro, kruco, greka kruco, bazarcentro;
3. novaj vortoj rilate religion: pastro, kardinalo, miraklo, fido, pia, hostio, sutano, surgenuiĝi, preĝi, krucumi, krucosigni.

Fine, ni starigis al la grupo la defion traduki la esprimon “*a imagem da santa*”. Ĉu vi havas rapidan proponon? Skribu al “Brazilei”!

Nia proksima subĉiela leciono estos vizito al Muzeo “Frei Galvão”, en la urbo Guaratinguetá. Ĉu vi emas ekskursi kun ni?

Lorena, majon 2008

Inciate de Lorena Esperanto Klubo, okazis en la 5-a de julio alia “subĉiela leciono”. Kun partopreno de venintoj ankaŭ el la proksimaj urboj Guaratinguetá kaj Taubaté, grupeto vizitis la Domon de Monaĥo Galvão, en Guaratinguetá. En tiu domo naskiĝis kaj vivis la unua katolika brazila sanktulo, kaj nun ĝi fariĝis muzeo. Ni lernis pri liaj vivo kaj mirakloj - inkluzive pri la famaj resanigaj “piloloj” (buletoj el papero, sur kiu legiĝas parto de preĝo). Ĉiu vizitanto ricevas kelkajn pilolojn donace. Portante Esperanto-ĉemizojn kaj la verdan standardon, la grupo kaptis la okazon por informi turistojn kaj oficistojn de la Domo pri nia movado. Unu oficistino aparte interesiĝis kaj petis retadresojn. Ĉar ne temas pri simpla turisma vizito, sed pri konversacia leciono, la tuta grupo kaptis la okazon por praktiki la lingvon kaj lerni novajn vortojn. Ekzemple: kiu estas la ĝusta signifo de la vortoj “pastro”, “pastoro”, “sacerdoto”, “monaĥo”, “diakono”, “imamo”, “mulao” kaj “rabeno”? Kiel oni diras en Esperanto “*novena*”? Kiel oni tradukas al Esperanto la esprimon “*por intercessão de Frei Galvão*”? La agrabla posttagmeza programo finiĝis per bongusta lunĉo en proksima kafejo. Ĉiuj revenis hejmen kaj englutis siajn pilolojn, kiuj resanigas de... krokodilado!

Paulo S. Viana



Ankaŭ esperantistino el la urbo San-Paŭlo, Milene Rinaldi, komence de tiu ĉi jaro havis la ideon proponi al kelkaj kolegoj viziton al Pinakoteko cele iom praktiki la lingvon. Grupeto de esperantistoj formiĝis kaj la vizito al la ŝtata Pinakoteko okazis la 18-an de februaro. La ideo plaĉis al la vizitintoj, kiuj proponis novan promenenon, ĉi-foje al Parko Ibirapuera, en la suda parto de la urbo, kie la grupo piknike kunvenis en la 17-a de marto.

La grupeto iom kreskis kaj ankaŭ ilia entuziasmo viziti novajn lokojn. En la 30-a de aprilo la celekskurso de la grupo estis la forsto *Itaguassú*, en la norda parto de la urbo. Laŭ raporto, unu el la ekskursanoj, kies vojo estis barita de sendanĝera blato, terure kriadis... Bedaŭrinde oni forgesis registri kiel oni terure kriadas esperante!

Kaj jen la plej lasta ekskurso de la babilema grupo: kvadrilo en apudurba bieneto apartenanta al komunumo pri kunhelpo al alkoholuloj nomata *Instituto Fratama pri Laboroterapio* (IFL). La ekskurso okazis la 8an de junio.

Ni sopire atendos fotojn (kaj ankaŭ raportetojn) pri novaj ekskursoj en la dua sesmonato ĉi-jara.

Fotoj pri jam okazintaj ekskursoj videblas en la fotoblogo de Joaquim Caldas ĉe la suba adreso.




http://miamondo.nafoto.net/arch2008-06-08_2008-06-14.html

Legideoj

El la LERNILOTEKO de edukado.net

Sylvain Lelarge



13 aktivaĵoj por antaŭeniri

Ingrediĉtoj :

revuo, ekzemple *Monato*, vortaro (prefere PIV),
kajereto, skribilo, kaj libera kvaronhoro

LAŬTLEGI POR LA KARA AVINO



Elektu interesan artikolon kaj imagu ke vi ĝin laŭtlegas al via malsana, preskaŭ blinda kaj sufiĉe surda avino; ŝi jes ja havas tute klaran menson kaj scivolemas pri ĉio... Ar-ti-ku-lu bone kaj elparolu bele! (Kaj ĝenerale, provu ofte laŭtlegi)

ILIA TITOLO, MIA ARTIKOLO



Rigardu la enhavon kaj elektu tiun artikolon, kies titolo inspiras aŭ surprizas vin; antaŭ ol legi la artikolon, imagu ĝin: antaŭpensu la ideojn, kiuj verŝajne estos prezentataj kaj notu viajn pensojn; listigu dek vortojn kiuj devus esti uzataj en la artikolo; sekve, kontrolu kaj donu al vi mem po unu poenton por ĉiu divenita vorto; se vi havas pli ol kvin poentojn, premiu vin per taso da teo, peco de muziko aŭ per alia artikolo.

STENOGRAFE



Elektu mallongan interesan artikolon kaj notu unu ŝlosilvorton en ĉiu frazo; post tio provu reverki la artikolon (ne gravas se vi ne laŭvorte reproduktas la frazojn; gravas redoni la esencon de la ideoj kaj faktoj).

GAZETULO



Legu mallongan amuzan novaĵon kaj rakontu ĝin al samideano (ĉu dum kunmanĝo, ĉu tra la reto); alia variaĵo estas trovi la amuzaĵon en nacilingva gazeto kaj traduki ĝin al Esperanto... kaj kompreneble sendi al www.edukado.net por Monda Mozaiko!

DEMANDOJ AL ĈAMPIONO



Legu artikolon kiu interesus alian esperantiston, notu ĉiujn interesajn faktojn kaj kreu 'kvizon' por testi liajn konojn.

FRUKTO EL LA ĜARDENO



Trovu en artikolo tiujn vortojn kaj esprimojn kiuj estas fakte novaj por vi, sed kiujn vi tamen komprenas sen uzi vortaron; notu ilin en vian kajereton kaj imagu kiel vi povus uzi ilin en via komunikado; ĉu en diskuto, ĉu en letero, ĉu simple en via persona pripensado pri la vivo. Kompreneble, vi povas krome ĉiujn nekonatajn aŭ apenaŭ konatajn vortojn serĉi en la vortaro, sed la rendimento estas multe malpli alta.

LA SUNO



Se vi trovas novan vorton, kies priskribo en PIV estas longa, desegnu suneton kun la elektita vorto en la centro sur paĝon de via kajereto; la radioj indiku la diversajn sencojn, uzojn, rilatajn vortojn, interesajn kunmetaĵojn; tiel strukturiĝas niaj cerbĉeloj, tiel funkcias nia cerbo.

MENSOGULO!



Preneu mallongan artikolon kaj enmetu en ĝin tri mensogojn; legu ĝin al iu alia kiu devas diri al vi 'mensogulo!' kiam li pensas trovi unu el la mensogoj.

KUNTEKSTO



Notu en vian kajeron la novajn vortojn kaj esprimojn de artikolo, notu ankaŭ la titolon kaj paĝon de la artikolo, por facile retrovi ĝin, sed ne notu la difinon de la vortoj; semajnon poste, reprenu vian liston, provu rememori la signifojn, kaj denove legu la artikolon.

FIDELA SPEGULO?



Legu frazon, kaŝu ĝin kaj provu reskribi ĝin; poste kontrolu kaj lernu el viaj eraroj.

PANEO (UZU DUOPE)



Laŭtleĝu al via partnero mallongan artikolon, tiel ke li/ŝi plene komprenu, kaj poste rekomencu laŭtleĝi ĝin, sed subite haltu meze de frazo; via partnero devas diveni la sekvan vorton. Eblas varii, haltante ekzemple:

- antaŭ vortoj kiujn vi mem ne aktive uzas, aŭ ne konis
- ĉiun dekan vorton
- antaŭ prepozicioj aŭ aliaj vortospecoj laŭ memdifinita regulo
- finlegante la frazon sed anstataŭigante la celvorton per 'bip'...

LA VIDPUNKTO DE LA SPECIALISTO



(Uzu duope): kritike legu ne tro longan artikolon pri temo kiun vi bone konas, kaj klarigu al via partnero kial kaj kiel via propra vidpunkto diferencas de tiu de la ĵurnalisto. Argumentu klare kaj koncize.

TABLOTENISO



(Uzu duope): kune legu artikolon kaj, finleginte, laŭvice nomu vorton kiu unufoje troviĝas en la artikolo. La partnero devas plej rapide trovi ĝin. Vi povas konkursi inter vi kontraŭ la horloĝo, ĉiam provante plibonigi viajn rekordojn por tri minutaj sesioj; estas bona ideo substreki stokon da uzablaj vortoj antaŭ ekludi

Mi deziras al vi oftan legplezuron!



Dua Vivo

Second Life

Thierry Salomon

Dua Vivo (“Second Life” en la angla) estas interreta virtuala mondo en kiu eblas interagi skribe, voĉe kaj geste. Ĝi konsistas el multaj insuloj dividitaj je terenoj.

Ĉiu uzanto povas elekti sian aspekton kaj aperas tie sub la formo de tiel nomata “avataro”. Por moviĝi avataro povas marŝi, kuri, flugi, kaj transportiĝi (“teleport”-iĝi kiel en *Star Trek*).

Grava flanko de tiu bela 3 dimensia mondo kun sonoj lanĉita en 2003 estas, ke la uzantoj mem kreas plejmultajn objektojn kaj servojn.



Picasa-fotoblogo de Eduardo I

KIO PRI ESPERANTO?

Verŝajne jam antaŭ 2006 estis esperanto-parolantoj en Dua Vivo, sed en tiu jaro aperis la unuaj esperantaj terenoj kiel ekzemple: Esperanto muzeo kaj Esperanto-parko. Antaŭe la parolantoj de la internacia lingvo apenaŭ eksciis unu pri la alia. Sed ekde kiam kelkaj el ili aĉetis aŭ luis terenon, tiuj lokoj aperas en la serĉilo de la programo kaj tiel irante tien eblas renkonti aliajn esperanto-parolantojn.

Nuntempe la ĉefa tereno por uzi la intergentan lingvon estas “Esperanto-Lando 1” administrata de Erick Nykvist kaj aliaj danoj.

Tie vi povas babili skribe aŭ voĉe kun esperanto-parolantoj el la tuta mondo.

Ekde oktobro 2007 okazas ankaŭ lingvokursoj tie. Anna Löwenstein gvidas la lundan kurson por progresantoj kaj Bea Alle'e la merkredan por komencantoj.

Dimanĉe estas konversacia rondo.

Krom tio kelkfoje estas organizataj prelegoj kaj kunvenoj (ekzemple virtuala kongreso).

Alia interesa loko estas la “*Muse dancejo*”, kie eblas aŭskulti esperantlingvan muzikon.

KIOM DA ESPERANTO-PAROLANTOJ EN DUA VIVO?

Malfacila respondo. Ekzemple en mia listo de amikaj kontaktoj mi havas 40 nomojn. Do verŝajne estas jam pli ol cent. Sed preskaŭ ĉiusemajne aperas novaj (ĉefe el *lernu.net*).

Ĉu temas simple pri ludo?

DUA VIVO NE (NUR) ESTAS LUDO

Ĝi fakte estas komunikilo kaj eĉ samtempe pagosistemo.

— Komunikilo kiel tujmesaĝilo (sen video sed kun sono) en kiu eblas babili kun pluraj personoj samtempe. Do ĝi iel similas al *Skype* aŭ telekonferencaj programoj kiel *ooVoo*.

— Pagosistemo, ĉar la valuto Lindendolaro (laŭ la nomo de la firmao, kiu kreis la programon) estas konvertebla al veraj dolaroj. Do tiu flanko similas al *Paypal*, *e-gold* ktp....

Do krom babili oni povas aĉeti aŭ lui terenojn aŭ tutajn insulojn, konstrui objektojn, vendi aĵojn aŭ servojn. Multaj grandaj famaj firmaoj faras reklamon tie aŭ vendas varojn kaj servojn pere de ĝi.

Kelkaj landoj eĉ jam malfermis ambasadejojn en tiu virtuala mondo.

Ankaŭ universitatoj uzas ĝin kiel helpo de malĉeesta lernado por lingvolernado aŭ aliaj fakoj.

Artistoj organizas ekspoziciojn aŭ kantas tie. Ekzemple la fama grupo U2 jam faris koncerton en Dua Vivo.

SED LA UZO DE DUA VIVO ESTAS SENPAGA

Oni nur bezonas sufiĉe modernan komputilon kaj rapidan interretan konekton. Vi povas senpage elŝuti kaj uzi la necesan programon. Nur se vi volas aĉeti modajn vestaĵojn aŭ terenon vi bezonas monon. Iom da mono eblas eĉ gajni en la tiel nomataj kampadejoj. Tie vi devas nur ĉeesti aŭ danci dum iom da tempo por ricevi kelkajn Linden-dolarojn.

Krom propran monunuon, Dua Vivo uzas ankaŭ propran tempon. Por ke uzantoj el ĉiuj mondpartoj povu interkonsenti pri rendezuoj, la horoj estas indikitaj en tempo de Dua Vivo.

Sed kontraŭe al la interreta tempo lanĉita de la firmao *Swatch*, ĉi tie la referenco ne estas Svislando sed la parto de Usono, kie troviĝas la sidejo de la kreantoj de la programo (PDT: Pacifika taga tempo).

Ekzemple nuntempe la kursoj por progresantoj okazas lunde je la 13a tempo de Dua Vivo, tio estas 17:00 brazila tempo kaj 22:00 mezeŭropa tempo.

KIUJ EBLECOJ POR DISKONIGI ESPERANTON?

Teorie Dua Vivo taŭgas por diskonigi Esperanton, ĉar tie renkontiĝas homoj el la tuta mondo kaj ili ofte spertas la problemojn de la lingva barilo.

Se iu legis ion pri Esperanto en biblioteko aŭ en interreto kaj entajpas “esperanto” en la ĉefan serĉilon de Dua Vivo li tuj povos iri al loko, kie oni parolas tiun lingvon.

En la programo oni povas rigardi priskribon de alia uzanto (intereskampoj, parolataj lingvoj), do homoj povas tiel hazarde vidi, ke ekzistas lingvo nomata Esperanto.

Alia ebleco estas fari (virtualajn) t-ĉemizojn, kiuj informas pri la internacia lingvo (tamen la aspekto kaj teksto devas esti bone elpensitaj).

Informoj pri Esperanto en frekventataj lokoj (kiel tiu en *Bellevue islet*) estas bona solvo.

Grupo ankaŭ komencis okupiĝi pri la traduko de la uzinterfaco de la programo al Esperanto.

Kelkaj membroj de la grupo “esperanto/parolantoj” jam iris babili voĉe aŭ skribe en ne esperantaj lokoj kaj ankaŭ komencis fari opinienketon pri la publika bildo de Esperanto.

Tamen ĝis nun ne ekzistas vera strategio por vere efike uzi tiun virtualan mondon por diskonigi Esperanton.

Iam hazarda ne esperantista vizitanto de Esperanto-loko diris, ke oni devus meti informtabulojn en pluraj lingvoj pri Esperanto en la esperantaj lokoj.

KIAL ONI ALIĜU AL DUA VIVO?

- Por praktiki la lingvon skribe aŭ voĉe kun personoj el la tuta mondo.
- Por babili kaj amikiĝi.
- Por sekvi kursojn pri Esperanto aŭ prelegojn en Esperanto pri diversaj temoj.

Ekzemple la 15an de junio Anna Löwenstein prelegis pri “la fontoj de la Majstro de l’ringoj de Tolkien”.

- Por aŭskulti esperantan muzikon kaj radioelsendojn, kiel ekzemple tiujn, kiujn Radio Jászberényi el Hungarujo dissendis. Eble baldaŭ ankaŭ *Parolu Mondo* aŭdeblas tie.

Esperanto-USA kaj la dana asocio havas informejojn kaj libroservojn en Dua Vivo. Se grandaj esperanto-asocioj kiel UEA ĉeestos, eblus pagi kotizon, aboni gazetojn, mendi librojn pere de Dua Vivo.

Por aliĝi senpage vizitu la retejon www.secondlife.com

Tie premu la butonon “Get Started! Membership is FREE!”.

La retpaĝoj mem estas nur en la angla, sed poste la programo ekzistas en pluraj lingvoj.

Vi trovos plian helpon, konsilojn, kaj ligilojn pri la uzo de la programo en la esperantlingva retpaĝo: duavivo.inf.hu

Thierry Salomon

Naskiĝis en Francujo sed loĝas en Budapeŝto de pluraj jaroj.

Laboras kiel komputada inĝeniero kaj tenisinstruanto.

Koncerne Esperanton ĉefe agadas por ĝia praktika uzo kiel intergenta lingvo (kaj ne kiel hobieto kia filatelio aŭ lingveto de aparta fermita rondo). Prizorgas la retejojn *esperantomarkoj.inf.hu* pri varoj aŭ firmaoj kun esperanta nomo kaj *informado.inf.hu* pri esperanto-informado.

Niajn dankojn: al Emilio Cid pro la sugesto aperigi la raporton; al la aŭtoro pro la permeso reprodukti ĝin kaj al Mirna Duarte — el radioprogramo *Parolu, Mondu!* —, kiu peris la kontakton.

Tiu ĉi artikolo estas podkaste aŭskultebla ĉe www.parolumondo.com

Pliaj informoj pri Dua Vivo legeblas ĉe

<http://www.edukado.net/pagina/DUA+VIVO/19773/>

<http://www.freewebs.com/duavivo/index.htm>

Komentoj: *Paulo Sérgio Viana*

Traduko tro fidela estas garantio pri traduko kripla, escepte se temas pri teknika-sciencia teksto, en kiu precizeco estas prioritata kaj sentoj ne intervenas. Traduki tekston implicas ĉiam subjektivan interpretadon. Alivorte, unua demando de tradukanto estu: “Kion la aŭtoro intencas?”. Dua demando estu: “Kiel oni atingas la saman intencon en la alia lingvo?”. Kompreneble, tiun problemon kaŭzas la fakto, ke la vortoj kaj parolturnoj dependas de la kulturoj, al kiuj apartenas la koncernaj lingvoj.

Traduki tekston de Clarice Lispector estas tipa defio pri subjektiveco. Kvankam ŝia stilo estas vorte simpla, la riĉeco de ŝiaj ideoj, ilia abstrakteco kaj simboleco kaŭzas malfacilajn barojn al tradukanto. Cetere, sub la plumoj de pluraj kompetentuloj, certe rezultus malsamaj tekstoj.

Ĉe la proponata originala teksto, la plej grava, eĉ ŝlosila esprimo estas: “*se eu fosse eu*”. La tuta disvolvo okazas ĉirkaŭ tiu ideo. En Esperanto, eblas: “se mi estus mi”, “se mi estus mi mem”, “se mi pensus kiel mi mem”, “se mi pensus kvazaŭ mi mem”, k.t.p.. Kiun elekti? Ĉi tie efikas la lingva sentemo de la tradukanto — unuj emas “ekspliki” la intencon de la originalo, aliaj preferas lasi la enigmon al la leganto mem.

Sekvas la rezultaj frazoj: “*se você fosse você*”, “*se eu fosse realmente eu*” — kaj la tradukoj devas esti kongruaj!

Aliaj problemoj:

— “*guardar*”: ne tre plaĉas al mi la vorto “gardi” (kiu havas la nuancon “defendi”, “protekti”); mi preferus “konservi”, “teni”, “enŝovi”, “enmeti” (tamen, depende de la frazkonstruo, ĉi tiu lasta ne tute taŭgas);

— “*mudar inteiramente de vida*”: “tute ŝanĝi la vivon”, “aliigi la vivon”, “modifi la vivon”;

— “*não me sinto bem*”: “farti” ne tute kontentigas min, ĉar ne temas propre pri sanstato, sed pri sentostato, do mi preferus “mi ne sentas min laŭvola/komforta/bone”;

— “*a procura se revela inútil*”: anstataŭ “neutila” mi preferus “vana”, “senrezulta”, “senfrukta”.

Unu el la tradukintoj plene meritas mian aprobon: numero 4. En lia teksto mi ne trovis erarojn, kaj oni legas ĝin flue kaj nature, kvazaŭ ĝi estus originala. Alia kandidato (numero 5) tre alproksimiĝis al tio, kaj mi volonte samniveligus lin, se mi ne legus en lia teksto la jenan esprimon: “... kaj iliaj vivoj ŝanĝis tute”. Mi fervore deziras kredi, ke temas pri tajperaro!

Aliaj tradukintoj, laŭ ĉiuj aliaj provoj, devas poluri sian posedon de Esperanto kaj trovi pli naturajn solvojn en nia lingvo. Mi listigas kelkajn esprimojn, kiuj montras tion:

- “Iafoje okazas sukceson.”
- “... impresas min la frazon...”
- “... la mensogo (...) estis kareseme translokiĝita ien”.
- “...tiaj personoj kiuj returne esti ili mem...” (!)
- “...personoj, kiuj (...) tute ŝanĝiĝis siaj vivoj” (!)
- “...mia fizionomio estus tute ŝanĝiĝita.”
- “... homoj, kiuj (...) tute ŝanĝis iliajn vivojn.”
- “... kaj mi ekpensiĝas.” (!)
- “... mi eksentiĝas.”
- “... kiuj subite pasis esti ili mem...”



La traduko-proponon, elektitan kiel plej bona, sendis la membro Fabrício Possebon el la nordorienta urbo João Pessoa en la ŝtato Paraíba. Kiel libro-donacon, el kvar opcioj, li elektis la libreton *La Divenistino kaj aliaj rakontoj*, de Machado de Assis. La rakontaron tradukis Paulo Sergio Viana, kiu ĉi-jare lanĉis plian rakonto-kolekton de la sama aŭtoro, nome *Geedza Kanzono kaj aliaj rakontoj*.

Premiita tradukaĵo:

En tiuj okazoj, kiam mi ne scias kien mi metis gravan paperon kaj ĝia serĉado sin montras nefruktodona, tiam mi demandas min: se mi estus mi mem kaj se mi havus gravan konservindan paperon, kien mi metus ĝin? Kelkfoje tio fruktodonas, sed multfoje la frazo “se mi estus mi mem” tiel min premas, ke la paper-serĉado fariĝas negrava, kaj mi komencas pensi, tio estas, senti.

Kaj mi ne fartas bone⁽¹⁾. Provu: se vi estus vi mem, kian solvon vi proponus? Komence oni sentas ian korporemon: la mensogo, en kiun ni trankvile nin metis, iomete sin movis el la antaŭa metita loko⁽²⁾. Tamen mi jam legis biografiojn pri personoj kiuj subite komencas esti ili mem, kaj tiam ili tute ŝanĝis sian vivon. Mi pensas, ke se mi vere estus mi mem, miaj amikoj ne salutus min surstrate, ĉar mia mieno estus ŝanĝiĝinta. Kiel? Mi ne scias.

LISPECTOR, Clarice - *A Descoberta do Mundo*, eldonejo Nova Fronteira, Rio de Janeiro, 1984, p. 228

[1] *Kaj mi ne sentas min bone.*

[2] Ne la loko estas metita, sed io metita en la loko. Sugesto de la provleganto: “...el la antaŭe okupita loko”.

Traduku la ĉi-suban elprenaĵon kaj sendu vian tekston rete al revuo@ileibr.org aŭ poŝte al la adreso de la Sekcio (vidu en la kolofono) plej malfrue ĝis la 25-a de aŭgusto 2008 . La plej bona traduko-solvo gajnos libro-premion.

Havia uma sombria tristeza na gente da casa-grande. Há três dias que ali não se dormia, comia-se às pressas, com o pavor da inundaçāo.

O engenho e a casa de farinha repletos de flagelados. Era a populaçāo das margens do rio, arrasada, morta de fome, se nāo fossem o bacalhau e a farinha seca da fazenda. Conversaram sobre os incidentes da enchente, achando graça atē nas peripécias de salvamento. Joāo de Umbelino mentia à vontade, contando pabulagens que ninguēm assistira. Gente esfarrapada, com meninos amarelos e chorōes, com mulheres de peitos murchos e homens que ninguēm dava nada por eles – mas uma gente com quem se podia contar na certa para o trabalho mais duro e a dedicaçāo mais canina.

Sāimos entāo para ver de perto o que o rio tinha feito. Na parede da estrebaria e nos paus do cercado ficara a marca das āguas. A boca da fornalha parecia um açude. Com mais de um palmo a casa de purgar teria ido embora. O cercado era um atoleiro por onde os bois iam deixando as marcas dos cascos. Por toda a parte um cheiro aborrecido de lama.

REGO, José Lins do – *Menino de Engenho*, 23-a eld., Eldonejo José Olympio, Rio de Janeiro, 1977 - p. 31

Al siaj gelernantoj iam Gilbert Ledon prezentis la frazon “Dio kreis la homo”, kaj petis ilin meti la akuzativigan “n” en la ĝustan lokon. La prudento sugestas, ke al la gramatika decido antaŭiĝu la religia. Oni unue decidu pri la ĉefrolulo de la verbo krei, tio estas, oni difinu ĝian subjekton, la kreinton. La dua rolulo estos la kreito, la rekta objekto. La unua devas esti en nominativo, la dua en akuzativo. Povas temi pri la risiko gramatikatenci aŭ sakrilegii. Pli bone estas lertiĝi pri la uzado de akuzativo por alkolizii nek la gramatikon nek Dion. Oni rigardu ambaŭ respektindaj, eĉ se ne samnivele.

La rolon de rekta objekto povas preni al si ankaŭ subpropozicio kaj ĉi-kaze ne estas la akuzativa “n”: En “*li diris, ke li venos*” la subpropozicio “ke li venos” estas la rekta objekto de la verbo diri. Ankaŭ numeraloj en la sama rolo ne ricevas la finan “n”.

Kompreneble ne ĉiuj decidoj pri la akuzativo estas tiel simplaj kiel la elekto inter kreinto kaj kreitaĵo. Ankaŭ tial ke povas esti plia verba rolulo – aŭ neniu. Estas ja senrolulaj verboj, kiaj estas la veteraj: pluvi, neĝi, venti. Tria rolulo prezentiĝas, kiam iun aŭ ion nerekte atingas la ago de la ĉefrolulo. Prepozicio enkondukas tiun nerektan komplementon: *Akuzativo dolorigas la kapon al iuj*.

Niajn jubileajn komencantojn kelkaj nomas bonantaguloj. Certe estas en tio iom da troigo. Same kiel troiga estas la epiteto “senakuzativa” rilate al esperantistoj, kiuj ofte preteratentas necesan akuzativigon. Oni devas rekoni, ke la regado super la akuzativo ne estas tre facile administrebla, sed la krombaptite senakuzativaj esperantistoj povas elekti inter gapi al aŭ alfronti la problemon. Inspiru ilin la stimulo de tio ke, kiel jam multe da kuraĝuloj konstatis, “*la malfacilaĵoj, same kiel la montegoj, ebeniĝas laŭgrade de nia antaŭeniro*”.

loma konfuzo komenciĝas jam en tio, ke duan rolon, la rektan objekton, havas nur transiraj verboj. Tiujn oni devas scii distingi. Plie, estas verboj, kiuj estas jen transiraj jen netransiraj. Povas esti, ke oni devas konsulti vortaron ne nur por scii la signifon de vorto, sed ankaŭ



por sciĝi pri ĝia gramatika klasifiko kaj, se verbo, pri ĝia transitiveco/netransitiveco. Estas bone ankaŭ, ke oni konu la rimedojn por transitivigi verbon cele al esprimo de specifa ideo ligita al ĝia signifo. Prepozicioj prefikse uzataj povas elvokive plenumi tiun taskon: *oni laboras multe por prilabori la teron, se oni volas tiumaniere perlabori monon por la vivnecesaĵoj*. La sufikso **ig** estas la plej uzata transitivigilo de netransiraj verboj: *Estas homoj speciale*

dotitaj por estigi gajecon en medio antaŭe malgaja.

Ni parolis pri la verbaj roluloj (subjekto, rekta kaj nereakta objektoj, kiujn oni devas identigi por adekvate uzi la akuzativon), sed estas ankaŭ la perakuzativa difino de celmovo. Do jen akuzativo anstataŭas prepozicion, jen ambaŭ pace kunvivas, ĉiu kun sia aparta funkcio. *Kuri antaŭ iu oni povas se oni estas jam antaŭ li*. Se oni ne estas, oni povas *iri antaŭ lin (al antaŭ li)* por poste kuri antaŭ li. Same oni unue *paŝas al la parko por povi paŝi en la parkon kaj poste paŝi en la parko*.

Oni akuzativigas ankaŭ lokrilatajn adverbojn, se per ili oni volas montri almovon. Plej uzataj estas “tien” kaj “kien”. Oni diras ankaŭ *proksimen, malproksimen, antaŭen, hejmen* kaj eĉ – malofte – *pluen*. Analogie oni povus diri ankaŭ “foren”.

Oni uzas la akuzativigan “n” eĉ interne de kunmetita vorto, en specife tradiciaj kazoj: *singarda, sindone, sindefenda*. Verdire tio estas nura anstataŭigo de la prefikse uzata vorto “mem”. Temas pri iaj aŭdacaĵoj, eĉ se inter ili Zamenhofaj, kiujn posta uzado sankcie tradiciigas kaj eĉ nuancigas rilate al la respondaj mem-vortoj.

Ni preterpase parolis pri akuzativo anstataŭa al prepozicio. Plej ofte tiun rimedon oni uzas kun temporilataj prepozicioj: *dato, horo, daŭro*. *En la 3-a de Julio, je la 9-a matene, ni ekverkis kaj laboris dum 3*

horoj: La trian de Julio, la 9an matene, ni ekverkis kaj laboris tri horojn. Ankaŭ kun la mezurilata "je": Alta je du metroj/alta du metrojn.

Sed la permeso perakuzative anstataŭigi kiun ajn prepozicion per la prepozicio "je" kaj tiun per la akuzativo estu modere uzata. Logiko, tradicio kaj lingva sento helpu nin. Logike rezoni ĉiu iomgrade povas, la tradicion oni konas per la legado de bonaŭtoraj verkoj kaj tiu estas ankaŭ la vojo por ekzerci sian lingvan senton. Kompreneble nura ekzereciĝado, eĉ se intensa kaj longdaŭra, ne povas fari el porlingve sentalenta esperantisto, ian esperantan Pelé-on. Krom la Fundamento kaj la PIV-serio, logiko kaj tradicio estas niaj normigiloj. Ili povas esti vojomontroiloj al lingva sento, sed nur tio, vojomontroiloj, ne garantio pri akuŝo de estontaj elstaraj verkistoj kaj seneraraj uzantoj de akuzativo.

Iama lernanto mia uzadis akuzativon kvazaŭ per preteratenta ŝutado de "n"-oj sur la tekstojn. Atentigite pri tio, ke uzi akuzativon anstataŭ nominativo, estas pli evitinda ol ne uzi necesan akuzativon kaj ke, en kazo de dubo, estas preferinde ne uzi ĝin, la proksiman ekzercon li sendis senakuzativa. Avertite, ke tiu ne estas bona elturniĝo el malfacilaĵoj, li pravigis sin per tio, ke la dublokoj estas tiel multaj, ke plej bone estas uzi la permeson, kun mi mem donis.

Se iu dubas pri la adekvata prepozicio por specifa kazo kaj uzas la prepozicion "je" aŭ akuzativon anstataŭe, tio estas ordinara sinteno. Kondiĉe tamen, ke li ne iel imitu mian lernanton. En la frazo "*mi legis lin la tekston, kiun antaŭe mi parolis lin*" trouzatas tiu licenco, sed ĝi estas gramatike akceptebla. Kaj ne tre malfacilas diveni ĝian signifon: *Mi legis al li la tekston pri kiu mi antaŭe parolis al li*. Tamen estas alia intervenanto en tiu afero, la komuna saĝo. Dank'al ĝi tiaj frazoj apenaŭ, se iam, aperas en niaj tekstoj. Tiu komuna saĝo povas porti nin al solvoj aliaj ol per la akuzativo aŭ prepozicio. Adverba esprimo povas kelkfoje adekvate anstataŭi ilin: *La lastan fojon/je la lasta fojo mi vidis lin povas iĝi lastfoje mi vidis lin; je la antaŭa/en la antaŭa tago povas iĝi antaŭtage*.

Apud la preparolataj verbaj roluloj aperas ankaŭ iaj kvazaŭaj akolitaj de du el ili, de la subjekto kaj de la rekta objekto. Temas pri la predikativoj, kiuj devas esti ĉiam en nominativo. Estas verboj kiuj, anstataŭ rektan objekton, petas aŭ permesas predikativon de la


subjekto. En *“la domo aspektas, ŝajnas kaj estas bona”*, la tri verboj estas en tiu grupo. *“Esti”* estas la plejmulte uzata kaj la aliaj kvazaŭ sufloras ĝian postmeton : ŝajnas esti, aspektas esti. *“Bona”* estas predikatvo de la subjekto.

La alian akoliton, la predikativon de la rekta objekto, nur la transiraj verboj povas havi, kompreneble. En la frazoj *“oni volis lin prezidanto”*, *“oni elektis lin prezidanto”*, *“oni faris lin prezidanto”*, la substantivo *“prezidanto”* estas predikativo de *“lin”*. En *“mi opinias ŝin inteligenta”* kaj *“vi trovis ŝin stranga”*, la adektivoj *“inteligenta”* kaj *“stranga”* estas predikativoj de la rekta objekto *“ŝin”*.

Ankaŭ en tiaj kazoj, se estas dubo, oni povas elturniĝe uzi aliajn rimedojn por diri la samon. Oni povas diri same bone , ke *“oni volis lin kiel prezidanton”*, *“oni elektis lin kiel prezidanton”*. En ĉi tiuj frazoj oni subkomprenas la vortojn *“oni volas”* kaj *“oni elektas”* inter la vortoj *“kiel”* kaj *“prezidanton”*. Kaj ĉi tio validas ankaŭ por la kunadjektivaj ekzemploj: *“Mi opinias ŝin kiel inteligentan (homon)”*, *“vi opinias ŝin kiel strangan (homon)”*.

Ni meteore superflugis la montegon kaj, de supre, ĝi ŝajnas ebena, plata, facile trairebla. Povas esti, ke ne tiel sentos la esplorantoj de la deklivaj padoj. Oni deziru al ili la kuraĝon entrepreni kaj la sukceson atingi, se ne la supron, almenaŭ la altecon necesan por havi kontentigan elrigardon.

Al tiuj interesataj pri la nuntempa uzado de la akuzativo jen sugesto: Legi la libron *“Materialo pri la nuna uzado de la Akuzativo”* de Daniel Moirand.



Invito al eldonado

Ĉu vi aŭtoras iun libron aŭ ludilon pri akuzativo celantan portugallingvanojn? Prezentu ĝin al ni. Se aprobita la materialo, ni eldonos ĝin partnere kun eldonejo Oportuno.

Kial mi estas instruisto

Antonio Felix da Silva



La Internacia Lingvo Esperanto ekzistas ekde 1887 kaj hodiaŭ multe da homoj bone parolas kaj skribas en Esperanto, sed malmultaj scias aŭ deziras instrui la lingvon. Kial tio okazas? Tio okazas, ĉar kelkaj scias, ke Esperanto estas tre facila kaj pro tio ili kredas, ke homoj povas lerni ĝin per lernolibro sen ĉeesto de instruisto.

Mi scias, ke multaj homoj bezonas la ĉeeston de instruisto por bone kompreni la lecionon, skribe kaj ankaŭ parole. La instruisto, kiel homo, povas helpi la lernantojn akiri memfidon kaj per ekzemplado li elmontras al lernantoj la facilecon de la lingvo.

Aliflanke la instruisto devas scii kiel bone instrui por trafi la celon de instruado. Pro tio estas necese, ke li akiru kompetentecon kiel instruisto. Ĉi tiu problemo estas aktuala kaj tre grava en nia lando. La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Brazila Sekcio de ILEI (ILEIBR) stimulas la instruistaron per artikoloj en la revuoj “Internacia Pedagogia Revuo” kaj “BRAZILEI” respektive.

Mi eklernis Esperanton en la urbo San-Paŭlo, sed bezonis foriri al la urbo *Montes Claros*, en la ŝtato Minoj, por labori. En tiu regiono ne estis esperantistoj sed homoj kiuj scias pri la ekzistado de la lingvo. Mi demandis al ili: Kion do vi volas? Ili respondis: Ke vi instruu Esperanton al ni.

Mi estas pedagogo, sed ne instruisto de Esperanto. Kion mi faru? Mi havis gramatikon, librojn kaj aldonajn notaĵojn de mia kara instruistino Elvira Fontes. Do mi proponis al ili krei Esperanto-Klubon por ke ni lernu la lingvon. Tiel naskiĝis en la jaro 1981 nova instruisto kaj Montes Claros Esperanto-Klubo.

En la jaro 2002 mi transloĝiĝis al la urbo Florianopolo en la ŝtato Sankta Katarino. En ĉi tiu urbo loĝas bonaj esperantistoj kaj kelkaj eĉ instruas la lingvon. Do, en 2004 la Centro de Studoj por Tria-aĝuloj (NETI portugale) ĉe la Federacia Universitato de Sankta Katarino, aprobis mian projekton por instrui la Internacian Lingvon Esperanto al tiaj homoj, lernantoj de NETI aŭ ne. Okdek gelernantoj registris sin en la kursoj de Esperanto ĝis 2007.

Mi subdividas la kurson de Esperanto laŭ Unua Etapo (Baza), kiu daŭras ses monatojn, Dua Etapo (Elementa), kiu daŭras du semestrojn, kaj Tria Etapo (Mezgrada Kurso), kiu daŭras du semestrojn. Mi instruas laŭ rekta metodo, alinome Cseh-metodo, per rondaj konversacioj kaj per la libroj *Unuaj Paŝoj* (Baza kaj Elementa Kurso) kaj *Survoje al Esperantujo*, ambaŭ de Elvira Fontes.

La kursoj ne postulas ekzemenojn, sed por ricevis atestilon la lernantoj devas ĉeesti 75% el la lecionoj. Dek ok gelernantoj finis la Unuan Etapon, ok gelernantoj finis la Duan Etapon kaj nur tri lernantinoj finis la Mezgradan Kurson. La mezgraduloj estas: Army Candemil Capanema, 84-jara, Inita Gilz Momm, 75-jara kaj Sônia Maria Pinto Viel, 59-jara.

Ĉi-jare mi instruas Esperanton en la Centro de Studoj por Tria-aĝuloj (NETI) ĉe la Federacia Universitato de Sankta Katarino (UFSC)^[1]. La kurso de Esperanto Unua Etapo komenciĝis en marto kaj finiĝis en junio; la Dua Etapo komenciĝos en aŭgusto kaj finiĝos en junio 2009. Dek du gelernantoj registriS sin en la kurso kaj ok daŭre ĉeestas ĝin. Tago de la kurso: lunde de 14h ĝis 15h30m.

Ĉi-jare mi gvidas ankaŭ kursojn de Esperanto ĉe *Holistika Centro Lumoj de Espero*^[2]. La Unua Etapo Komenciĝis en februaro kaj finiĝis en junio kaj la Dua Etapo komenciĝos en aŭgusto kaj finiĝos en



junio 2009. Tridek tri gelernantoj registri sin en la kurso kaj dek naŭ daŭre ĉeestas ĝin. Tago de la kurso: merkrede de 19h ĝis 20h30m.

Mi instruas Esperanton, ĉar mi lernas dum mi instruas. Krome, la voĉo de Zamenhof ankoraŭ estas aŭdinda por mi:

“Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan Rondon familian.”

ANTONIO FELIX DA SILVA – 2008 - VD kaj FD (instruado; verkado; armeo)
en Florianopolo – SC.

-
- [1] Campus Universitário Trindade – Caixa Postal 476 – CEP 88040-900 – Trindade – Florianópolis – SC – Telefonoj: (048) 3721-9445, 3721-6559 kaj 3721-9909; retejoj: www.ufsc.br, www.neti.ufsc.br; retpoŝto: neti@neti.ufsc.br
- [2] “Centro Holístico Luzes da Esperança” - Servidão Netuno, 153 – Praia dos Ingleses – CEP 88058-340 – Florianópolis – SC – Telefono: (048) 3369-2610, www.chle.org.br kaj retpoŝto: chle.ingleses@gmail.com

Gogo la testudo – Martin Weichert



La Biblioteko kaj retbutiko de la Sekcio pliriĉiĝas per donaco de libroj fare de la membro Newton Monteiro. Aparte vi trovas liston de la donacitaj libroj. Pri duoblaĵoj (60 ekzempleroj) de la du libroj aŭtorataj de Newton Monteiro mem, parto estos destinata al la libroservo de la Sekcio kaj parto estos proponata al la kampanjo Esperanto en la Bibliotekojn de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio. Pri la ceteraj libroj, parto estos destinata al la biblioteko de la Sekcio kaj parto estos proponata al apudkvartalaj bibliotekoj.

Prof. Newton José Monteiro estas aktuario, verkisto, tradukisto kaj instruisto.

Li konatiĝis kun Esperanto en 1946, pere de kurso ĉe FEESP (Spiritisma Federacio de Ŝtato San-Paŭlo) gvidata de la karmemora Arnaldo Viana, de kiu li transprenis, unu jaron poste, la instrugvidecon. Lia porinstruista agado en tiu medio daŭris de 1947 ĝis 2007. Dum kelkaj jaroj li sekretariis la laborojn de Brazila Sekcio de ILEI, kiam ĝin estris la karmemora pedagogino Elvira Fontes.

Li aŭtoras plurajn librojn pri Matematiko kaj Geometrio. Koncerne Esperanton, li verkis tri lernilojn: *“Aprendendo Esperanto”*, Plêiade, 1999; *“Esperanto - curso sem mestre”*, Edições Nosso Lar, 1995 kaj *“Ekzercaro pri Sufiksoj kaj Prefiksoj”*, Plêiade); kaj unu fakan libron: *“Laŭsistema Studo de funkcioj”*, eld. de la aŭtoro, 1960.

Li retiriĝas de la esperantista movado pro okulmalsano, kiu malpermesas lin bone legi, kaj ankaŭ por sindediĉi plentempe al siaj volontulaj okupoj en tiu medio, kiu konatigis lin al Esperanto. Malgraŭ tiu okulmalsano, li daŭre abonas revuojn, ĉar li konscias pri la valoro de tiuj eldonaĵoj por la evoluo de la lingvo kaj por la bonfarto de nia revuaro.

Nome de nia trikapa laborteamo kaj de la tuta membraro, ni kore dankas vin pro via subteno ankaŭ materia al nia porinstruista agado. Via faro estas granda instigo kaj vivleciono por ni, kiuj bezonas praktiki la bonan pedagogion, nome instrui per ekzemploj.

José Roberto Tenorio
Provizora sekciestro

Ĉu-ludo

Jen ludo tre populara ĉe lingvaj instruistoj. Ĝi konsistas el ĉu-demandaro, kies respondo, unuopa aŭ komuna, estu JES aŭ NE. Ĉi-sube ni prezentas variaĵon de tiu ludo cele al ekzercado de prepozicioj.

Materialo bezonata: kelkaj ordinaraj objektoj strategie kaj videble aranĝitaj ene de lernoĉambro.

Antaŭ ol komenci la ludon, memorigu la lernantojn pri plej uzataj prepozicioj, listigante ilin sur la tabulo: *apud, en, inter, (mal)antaŭ, super, sub, sur...* Post tio, proponu al viaj lernantoj jenan defion: petu, ke ĉiu mense elektu po unu objekton kaj vi provos diveni ilin per ĉu-demandoj. Pro didaktikaj kialoj, kuraĝigu ilin al kompletaj respondoj.

Elektu alian lernanton kaj daŭrigu la ludon. Post kiam ĉiuj lernantoj ludis, proponu jenan duan defion: nun vi pensos pri iu enĉambra objekto kaj ili provos diveni ĝin. Laŭ kiomo da lernantoj kaj tempo disponebla, proponu ankaŭ, ke ili kunludu inter si.

- Ĉu la objekto estas **ANTAŬ** mi?
- Ne, la objekto ne estas **ANTAŬ** vi.
- Ĉu la objekto estas **APUD** vi?
- Ne la objekto ne estas **APUD** mi.
- Ĉu la objekto estas **SUPER** niaj kapoj?
- Jes, la objekto estas **SUPER** niaj kapoj.
- Bone! Ĉu la objekto estas la lampo?
- Jes, la objekto estas la lampo.

Rimarkoj:

1- Tiu ĉi ludo povas esti uzata por ĉiuj lingvaj niveloj. Okaze de ludado kun progresantoj, ne forgesu prezenti variaĵojn por la verbo ESTI: Ĉu la objekto staras / kuŝas / troviĝas...?

2- Anstataŭ listigi la prepoziciojn sur tabulo memorcele, oni povas disdoni antaŭpreparitan liston de plej uzataj prepozicioj. Tia surtabula aŭ surkarta listo, krom helpi forgesemulojn, trafe memorigas la ludantojn, pri la celo de la ludo.

Konsult- kaj inspirfonto: Lingvaj ludoj de GEA, kompilita de Elisabeth Kuhl kaj eldonita de Gernana Esperanto-Junularo - 2-a eldono, 1982.

Pluvo



Ilustraĵo kaj paĝarango:
Eder Benedetti

**La maljunulo
preterpasis grumblante;**

**La junulo, siavice,
kriadis stultaĵojn...**

Virino restis histerie...

**Nur pro tio, ke la pluvo
surprize
ekfalis sur ĉiujn.**

**Sed rozujo burĝonis ete...
kaj silente ekridetis Dio.**

David Bianchini




Manlibro pri Instruado de Esperanto

Gvidlibro por kursgvidantoj



Rat-Man
Bildrakonto
de la furora
flava ratulo



Poŝamiko
Laŭtema
vortaro kaj memorigilo



Komputeko
prikomputila
terminaro

Ĉu vi aŭdis, ke...?
Komprenekzercoj
kun sonmaterialo



Vizitu la retbutikon de Brazila Sekcio de ILEI

www.ileibr.org/butiko